


SVENSKA ESPERANTO-TIDNINGEN LA ESPERO

ORGAN FÖR ESPERANTORÖRELSEN I SVERIGE



Aktuala bildo

HONORATUS BONNEVIE

La norvega esperantista veterano,
nun 75-jara, dum multaj jaroj kun-
redaktoro de tiu ĉi gazeto.

SVENSKA
ESPERANTO-TIDNINGEN
LA ESPERO

ORGAN FÖR ESPERANTORÖRELSEN I SVERIGE

Redaktör: Bernhard Eriksson.

Postadr.: Biblioteksgat. 30, Stockholm.

Tel. 10 53 27, 11 27 53.

Prenumerationspris: Helt år kr. 2:50.

Lösnummer 025.

Annonspris: 15 öre pr mm.

Utkommer en gång i månaden.

SVEDA ESPERANTO-GAZETO

Redaktanto: Bernhard Eriksson.

Adreso: Biblioteksgatan 30, Stockholm.

La administracio: Box 698, Stockholm.

Anonco pri korespondado kostas

2 respondkuponojn.

Abono eksterlanda: 1 jaro 3:— sv. kr.

Svenska Esperanto-Förbundet

(Sveda Esperanto-Federacio)

Adress: Stockholm 1.

Postgirokonto N:r 2012.

Årsavgift för direkt anslutna medlemmar kr. 5:— inberäknat pren.-avgiften för Svenska Esperanto-Tidningen.

Ordförande: Paul Nylén, Huddinge.

Telefon: Huddinge 279.

Sekr.: Ernfrid Malmgren, Heleneborgsgat. 6, Stockholm. Tel. 41 03 04.

Svenska Esperanto-Institutet

Postadr.: Box 698, Stockholm.

Postgiro 515 11.

Avd. för examens- och språkfrågor: Rektor Sam Jansson. Tel. Lidingö Villastad. 295. — Avd. för ekonomi, statistik, kurser: E. Malmgren.

Sv. Lärares Esperanto-Förbund

(Sveda Instruista Esperanto-Federacio)

Ordf.: Thorsten Torbjär, Mariagat. 15, Göteborg.

Sekr.: Gustav Rimberth, Kommendörsgatan 41, Göteborg.

Kassör: Oskar Svantesson, Karl Johansgatan 61, Göteborg.

Årsavgift 2:— kr.

Läroböcker, Ordböcker

m. m.

Systematisk kurs i Esperanto. Av Seppik-Malmgren. En enkel och lätt lärobok för nybörjare... 0:75

Esperanto utan förkunskaper. Av Harald Skog o. Sam Jansson. 0:50

Övningsbok till d:o. 0:50

Praktisk lärobok i Esperanto för kurser och självstudium. Rik på förklarande exempel. 2:—

Kurs i Esperanto. Del I. Av Fritz Lindén. Synnerligen enkel. .. 0:90

D:o. Del II. Läsebok. 0:90

Lärobok i Esperanto för A.B.F. och andra studiecirkclar. Av Jan Mas-siak. Inb. 2:50

Kommentarer till d:o. 1:—

Esperanto-Kurso. Av V. Setälä. En enkel och trevlig läsebok. Ill. 0:50

Esperanto-Grammatik. Av Lärov.-adj. Nils Nordlund. 1:50

Nyckel till Esperanto. Miniaturlärobok med ordlista. 0:10

Dubbel Fickordbok i Esperanto. Av Carl Ohlsson. Svensk-Esperantisk o. esperantisk-svensk ordbok. 1:50

Esperantisk-svensk Ordbok. Av P. Nylén. 232 sid. Häft. 3:75

D:o, inb. i hållbart klotb. 5:—

Svensk-Esperantisk Ordbok. Av G. H. Backman. För tillf. slutsåld.

Esperanto-Ordbok. Av N. Nordlund. 1:—

Prepositionerna i Esperanto. Av N. Nordlund. 0:75

Fundamenta Krestomatio. Av D:r L. L. Zamenhof. Läsestycken avsedda att utgöra mönster för god esperantostil. 3:25

Dialogoj en Esperanto. Por kursoj kaj grupaj kunvenoj. Av Einar Dahl. 32 sid. 0:50

Förlagsföreningen Esperanto u. p. a.

Box 698, Stockholm 1. Postg. N:r 578.

Tel. 31 65 01.

Kont. o. exp.: Sveavägen 98 5 tr. Kl. 9-17.

Order överst. 10 kr. försänd. portofritt. Vid ins. av förskottslikvid för mindre order bif. 10 proc. till portokostnader. Fullständig prislista på begäran gratis och franko.

ESPERANTO-TIDNINGEN

LA ESPERO

ORGAN FÖR ESPERANTORÖRELSEN I SVERIGE

Ett intensivt, aldrig slappnande intresse för 1934!

Se där vad vi vänta av det nya arbetsåret.

Tre månader kvar, och så äro vi inne i 1934. Och ha vi hunnit dit — sedan springa månaderna av sig själv fram mot den svenska esperantovärldens stora dagar — augustidagarna 4—11.

Mycket arbete är redan nedlagt för dessa betydelsefulla dagar. Över året ha intresserade krafter planerat och organiserat. Arbetsuppgifter ha funnits och finnas kvar i än större grad. Alla krafter spännas för att göra 1934 års Universella Esperantokongress till vad den är åsyftad att vara — en hela esperantorörelsens stora manifestation utåt och ej minst en de svenska esperantisternas jättelika uppslutning kring den gröna fanan.

Det beror dock inte enbart på dem som ha hand om kongressmaskineriet om kongressen skall bli den succé vi hoppas på. Härvidlag ha alla esperantister i vårt land sin givna uppgift. Den nämligen att intensivt arbeta för massdeltagande. Det gäller att i god tid,

d.v.s. nu (kom ihåg den billigare kongressavgiften m. m.), organisera deltagandet från var och en sin ort. Lita icke på att det sköter den eller den om — det kan mången gång medföra besvikelser. Sätt igång själv! Säkerställ ditt eget deltagande, men se även till att du ej blir den enda från din ort. Nöjet blir dubbelt större om man delar det med andra.

Är du medlem i din esperantoklubbs styrelse vet du din plikt gentemot dem som valt dig till denna förtroendepost, är du det inte bör du låta din styrelse veta det intresse du och andra ha för saken.

Allt som allt: ett intensivt arbete för en kongress, som ställer alla övriga i skuggan! Förutsättningar finnas.

Låt det bli en mönsterkongress!

En rekordkongress!

Och svara för dig själv för den saken!

BEn.

Sådan vet man aldrig, man går i saken okunnigt

SIR LINDNER
VOLUNTCATAN 97
STOCKHOLM

Segra kunna vi, men vinna vi?

Nyss inkom till Institutet en officiell anhållan från Sveriges största lärarförbund att erhålla uppgifter om Esperanto-undervisning i folkskolan. Meddelande önskades om såväl obligatoriska som frivilliga kurser, stora och små.

Vad kunde Institutet lämna för uppgifter? Jo, att ett fattigt 10-tal platser haft barnkurser! De lämnade upplysningarna bragte sannerligen ingen gloria över Esperanto-rörelsen i vårt land.

Så bristfällig i alla avseenden har nämligen inrapporteringen rörande kurser och speciellt rörande barnkurser hittills varit.

En fullständig omläggning av taktiken är nödvändig, om vi skola kunna vänta oss resultat av vårt arbete och av våra vunna segrar. Ty fortsätta vi som hittills, kunna vi vinna tusentals enstaka segrar och ändå förlora kriget med glans.

10 rapporterade kurser äro ojämförligt mycket mer värda än 100 icke rapporterade. Ty de rapporterade kurserna stödja varandra och ge rörelsen ryggrad, men de orapporterade kurserna verka som slag i luften.

Inrapportering av kurser måste hädanefter vara en hederssak för varje lärare och kursledare. Om så blir, då behöver Svenska Esperanto-Institutet ej med ängslan emotse kommande förfrågningar från officiell organisation eller myndighet.

Kursrapport, som kan skrivas å brevkort, skall innehålla uppgift om a) plats b) lärare c) antal deltagare d) metod eller lärobok e) om det är nybörjar- eller fortsättningskurs.

Skolkurs-rapport bör innehålla a) skolans namn b) skoldistrikt c) lärarens namn d) vilken klass som undervisats e) antal elever f) metod eller lärobok g) antal timmar per vecka h) om undervisningen varit förlagd inom eller utom schemat.

Rapporterna skola göras korta och koncisa. *Insändas vid kursens början.*

Hädanefter skola vi inte endast segra, vi skola även vinna kriget!

Svenska Esperanto-Institutet.
Ernfrid Malmgren.

En storartad succès

har startandet av serien Svenska Esperanto-Förbundets handböcker blivit. Nr 1 i serien, "Hur man leder en fortsättningskurs i Esperanto" av Einar Dahl, har fått en strykande åtgång, och förbundets medlemmar ha naturligtvis begagnat sig av sin rätt att få 50 % rabatt på boken. Det synnerligen välvilliga mottagandet har föranlett förbundsstyrelsen att påskynda följande nummer i serien. Redan i november utkommer nr 2 i serien: "Esperanto-klubben" författad av S. E. F:s sekr. Ernfrid Malmgren. De olika kapitlen i boken lyda: 1. Varför bilda en Esperanto-klubb? 2. Hur bildas en klubb? 3. Klubbens styrelse. 4. Klubbens inre arbete. 5. Klubbens yttre uppgifter. 6. Stenografiskt referat av ett sammanträde. 7. Ett mönster-protokoll. 8. Mönsterstadgar.

Svenska Esperanto-Förbundets medlemmar komma att även å denna bok erhålla 50 % rabatt.

Alla klubbar

uppmärksammas på fördelen att nu låta nyansluta de medlemmar, som ej redan tillhöra Svenska Esperanto-Förbundet. Medlemmar, som nu anslutas utav klubb, erlægga endast avgift för 4-de kvartalet, d.v.s. 25 öre, och erhålla dock 1933 års matrikel jämte rättighet att till rabatterat pris köpa förbundets handböcker.

Enskilda medlemmar erlægga för 2-a halvåret för medlemskap 2:50 kr., inkl. prenumerationsavgift å Svenska Esperanto-Tidningen.

Svenska Esperanto-Förbundet.

Affischer

ha iordningställt med anledning av nästa års kongress. Den ena affischen är avsedd för utlandspropaganda och visar Stockholms stadshus, bredvid vars torn lyser den gröna esperantostjärnan och orden Bonbenon al belega Svedlando!

Den andra affischen är avsedd att användas av svenska klubbar och enskilda esperantister vid olika slags affischering inom landet. Den är synnerligen verkningsfull och användes med fördel vid kurspropagandan samt vid sammanträden o.s.v. Pris 5 öre pr st.

1. 1934 blir de svenska esperantisternas stora år. Betänk detta!

Esperantoekspozicio en Gotenburgo.

Por pligrandigi la intereson pri esperanto en nia urbo, la kluboj ĉi-tie aranĝis sufiĉe grandan ekspozicion. Ĝi estis malfermata la 24-an de aŭgusto kaj fermata la 8-an de septembro.

La ekspozicio estis lokata en la Studhejmo de A.B.F., kie oni al ni disponigis du grandajn ĉambrojn. La materialo estis vere ampleksa. Unue en la vico inter la ekspoziciaĵoj venis bildoj de kelkaj esperantistaj gvidantoj kaj konataj personoj. Plej alte, rigardante sian verkon, sidas Zamenhof mem. Tuj sube koketas "Elinjo", kaj la avo de la sveda movado mordas siajn decimetrolongajn lipharojn. Unikaj eble estas kelkaj bildoj, kiuj koncernas la unuan kongreson en Boulogne.

Ĉe venonta paŝo ni staras antaŭ granda "suno" de kovertoj, kies poŝtmarkojn oni ŝparis. La eroj de la kolekto kompreneble devenas de ĉiuj partoj de la tero. Oni per tiu punkto intencis vekti la intereson de filatelistoj.

La interŝanĝa materialo estas ampleksa. Plej okulfrapantaj estas la multaj revuoj el Japanujo, kiu estas lando tre ŝatata de la esperantistoj.

Kelkajn kvadaratajn metrojn kovras amaso da bildkartoj. Por instruistoj, kiuj deziras havigi bildojn el fremdaj landoj, certe estas bona rimedo havigi tiajn per korespondado. Oni tiel ne nur ricevas la bildojn, sed ankaŭ aŭtentikajn sciigojn pri la fremdaj aperaĵoj. Ankaŭ la bildoj estos freŝaj, kio la bildoj el la diversaj eldonejoj tute ne ĉiam estas.

La turisma parto estas iom impona. Pluraj dekoj da gvidiloj tra la plej malsamaj urboj kaj landoj estas montrataj. Ĉeflokon okupas kelkaj afiŝoj el foiroj, sed tio ne estas miriga, ĉar la alteco de la afiŝoj ne multe malsuperas al unu metro.

La esperanta gazetaro estas reprezentata per bela bukedo de ĉ. sesdeko da numeroj. La sveda gazetaro ankaŭ havas reprezentantojn tie, nome tiuj gazetoj, kiuj havas pli malpli regule esperantokolonon. Tiuj gazetoj estas iom pli ol dudek. La eksterlandaj gazetoj kun esperantokolono estas multnombraj.

Kelkaj grafikaj tabeloj montras la progreson de la esperantomovado. Precipe frapanta ja estas la loko de nia lingvo en la studrondoj de ABF, kie esperanto estas absolute supera laŭ la nombro de rondoj, en kiu ĝi estas studata.

La esperanta literaturo estas reprezentata per ĉ. 300 volumoj.

Gramofono jen instruas la lingvon laŭ "Linguaphone"-sistemo, jen kantas ariojn aŭ ludas la himnon.

Unu tuta ĉambro estas okupata de ekspozicio, kiun pretigis la tramista klubo en Gotenburgo. Ĝi estas la sama aŭ proksimume la sama, kiun oni montris en Stokholmo dum la kongreso. Siaspece ĝi estas pli valora ol la ĝenerala ekspozicio, ĉar ĝi enhavas ampleksan materialon el ĉi tiu limigita sfero. Tamen laiko ne bone povas ĝin priskribi. Ĝusta loko por detala priskribo certe estas la landa faka organo. Ordinara homo tamen estas frapata de la amaso de fotografiaĵoj pri teknikaj detaloj ĉe tramoj, kondukiloj ktp el diversaj urboj, kaj de la planoj pri la tramreto de la mondurboj kaj la biletsistemoj en diversaj lokoj.

La ekspozicio estas aranĝo por altiri la intereson de la publiko al esperanto antaŭ la komenco de la aŭtunaj kursoj, kiujn gvidos ĉi-tie ĝesinoroj Seppik, kaj certe ĝi plenumis bone sian taskon, ĉar ĝi estas bone vizitata, kaj preskaŭ ĉiuj urbaj gazetoj favore raportis pri ĝi.



Kongressanmälan

till nästa års kongress bör insändas i god tid, helst omedelbart. Rabatterad anmälningsavgift för dem, som anmäla sig före den 1 april 1934. LKK har medgivit för svenska deltagare, att avgiften kan få erläggas i två omgångar om 10 kr. vardera. Om någon önskar spara pengar till kongressens övriga utgifter, t. ex. för mat och logi, kan detta ske genom att större eller mindre belopp insändes till kongressen, varvid naturligtvis skall anges, att kongressens "sparbank" anlitas.

XXVI Universala Kongreso de Esperanto,
Fredgatan 4, Stockholm.

Loka Kongresa Komitato.

2.

STOCKHOLM är esperantisternas stolta stad år 1934. — Bered dig!

Distriktaj kunvenoj.

Blekinge.

Dimanĉe la 16-an de Julio kolektiĝis en Hällevik la esp.-istoj de Blekinge. Piede, bicikle, vagonare kaj omnibuse alvenis sesdeko da samlingvanoj el ĉiuj partoj de la "ĝardeno". Unua programpunkto estis — kompreneble post longa vojaĝo en la varmo — procesio rekte en la logantajn ondojn de la Hällevik-a golfeto. Nur post unu horo oni povis transiri al la dua punkto: kolektiĝo ĉirkaŭ la kafotablo. S-ro Ysner, la senlaca prezidanto de la loka esp.-klubo, bonvensalutis la kunvenintajn esp.-istojn, i. a. d-ro Beckman el Skara, adj. Nordlund el Kristianstad kaj kursgvidanto Rois el Aŭstrio.

Post unisonkanto "La tagiĝo" la vorton prenis d-ro Beckman. En elokventa parolado li montris la neceson de neŭtraleco de helplingvo internacia kaj la preferindecon de Esperanto antaŭ aliaj helplingvaj projektoj. Li ankaŭ parolis pri la progresoj de Esperanto sur diversaj kampoj, tiel montrante, ke inter ĉiuj "mondhelplingvoj" Esperanto estas plej taŭga kaj plej disvastigita. Per forta aplaŭdo dankis la publiko esperantista kaj neesperantista. Tiu lasta estis allogata per la alte super la arbopintoj flirtanta verda standardo, per la fremdaj sonoj en parolo kaj kanto, kaj ne laste per la tre ampleksa ekspozicio de libroj, gazetoj, leteroj, poŝtkartoj, ktp., aranĝita de la Hällevika klubo.

Sekvis banpaŭzo kaj baldaŭ sur la marbordo estis aŭdebla la gaja babilado de la banantoj. Ree oni kolektiĝis, por aŭskulti kelkajn esperantistajn kantojn, kiujn bonege prezentis knabina ĥoro de Hällevika lernejo sub gvido de s-ro Ysner. Ho, pardonu, ankaŭ kelkaj knaboj estis inter la kantistaro. Meritita aplaŭdo ne forrestis.

En saloneto de la banhotelo poste prelegis adj. Nordlund el la manuskripto por nova libro, kiun la konata verkisto intencas eldoni. La temo estis: "Proverboj en Esperanto." La prelego fariĝis tre interesa leciono, kiun oni vigle partoprenis. Bedaŭrinde tro frue ĝi finiĝis. — Komune oni poste ekskursis al Stiby-montego, de kies supro la okulo ĝuas belegan panoramon. Post kelkaj kantoj parolis aŭstra samideano Rois pri la

skandinava konferenco, okazinta la 8—10-an de Julio en Aalborg — Danlando, pri la 13-a kongreso de SAT en Stockholm kaj pri la kongresoj de UEA en Köln kaj Stockholm. — La prezidanto de la distrikto, s-ro Ahnfeldt el Rödeby, dankis al la esp.-istaro pro multnombra partopreno kaj esprimis la elkoran dankon de la gastoj al la aranĝinta klubo. — Restis komuna tagmanĝo en la banhotelo kiel lasta punkto en la tagordo. La bonhumoro reganta ĉetable pruvis la kontenton pri la tago. — Kaj nun? La sekretario de Hällevik-a esp.-klubo laŭtleĝis — kun kontenta rideto — la protokolon pri sukcesplena esperantotago.

"Malmfältens Esperantister"

havis sian jarkunvenon en la malgranda vilaĝo Soutojärvi 16. 7. En la kunveno partoprenis "verduloj" el Kiruna kaj Malmberget.

La estraro estis reelektata kaj konsistas el jenaj k-doj: Karl Backman, J. Westberg, A. Nilsson, Kiruna, kaj G. Wallgren, G. Hallin, Malmberget.

Post la kutimaj jarkunvenaj aferoj oni transiris al la pli gaja kaj "malmana" laboro, nome ludi piedpilkon. La samideanoj el Kiruna invitis la ercmontanojn al granda piedpilka batalo. Pasintan someron ili nome faris grandan malsukceson kaj nun volis kapti la okazon por rebonigi sian renomon. Dirite farite. La plano por la batalo baldaŭ estis plenplena kun perfektaj kaj *kelkaj* ne perfektaj "ludistoj". Sur la bariloj ĉirkaŭ la plano sidiĝis la tuta vilaĝanaro por rigardegi la esperantan spektaklon. La ludistoj el Kiruna estis tipoj de Calle Westergren dum la ercmontanoj estis tre similaj al S.O.S. Kiel kutime servis "fajfisto" por juĝi la batalon. Estus multe por skribi pri tio, sed sufiĉas se mi konstatu: 1) la invitantoj de la batalo suferis malgrandan malvenketon (laŭ ilia propra opinio tute malĝustan). 2) ke la kirunaj fuŝkuracistoj havis tre urĝan lundon pro granda esperanta klientaro 3) pli kapabla "fajfisto" ol la sutojërva ne ekzistas (li nome estis ercmontano).

Post tiu venko aŭ malvenko ni tuj eniris la lagon por malvarmigi niajn varmegajn vidindajn korpojn. La lamuloj kompreneble ne povis iri. Ni amuziĝis multmaniere kaj la tago pasis tre rapide. Kaj por havi ĝin en bona me-

moro ni ankaŭ eterniĝis (B.v. vidi bildon p. 117!). Ĉiu "skatolposedanto" eluzis la okazon por ricevi belegajn fotografajojn. Je la 7,30a ni disiĝis kantante esperante, esperante ke ni en venonta kunveno havu saman bonegan tagon en la verda signo dum la blua ĉielo.

Liafilo.

Kongreseto en Motala.

En la bele situanta somerkunveno de la esperantistoj en Motala ĉe Råsnäs kolektiĝis 22. 7. la gesamideanoj de Östergötland por kongreso. La kongreso fariĝis vere internacia pro ĉeesto de niaj samideanoj Tiberio Morariu el Rumanujo, Albert Rois el Aŭstrio kaj Sip Stuit el Nederlando. La eksterlandaj samideanoj gajigis nin dum la tuta kongreso, ne nur per interesaj kaj amuzigaj paroladoj sed ankaŭ per kantado. La kongreso daŭris dum du tagoj kaj laŭ la opinio de la ĉeestintoj ĝi estis la plej sukcesa kiu iam okazis en la distrikto. Oni povis konstati ke la movado en la distrikto estas ĉiam kreskanta kaj ke ĝi nun estas bonege organizita. Ni ŝuldas dankon al nia distrikta prezidanto sam. Axel Allard, sub kies gvido la movado en la distrikto evoluis rapide kaj la organizado atingis sian nunan staton.

S. U.

Smålands Esperantosällskap

höll i medio av juli årsmöte i Växjö.

Den viktigaste punkten på dagordningen blev frågan om sällskapets omorganisering till distrikt av Svenska Esperantoförbundet. Då förutvarande styrelsen uttalat som sin mening, att Växjö vore lämpligaste orten för verkställande utskottet, valdes den nya styrelsen med hänsyn härtill. I denna invaldes folkskol. Paul Jacobsson, elektriker Einar Karlsson, handl. Hilding Friberg, samtliga i Växjö, verkmästare Adolf Karlsson, Gämla, och lantbrukare Fredrik Johansson, Blädinge. Efter livlig diskussion beslöt mötet enhälligt sällskapets ombildande till distrikt av Svenska Esperantoförbundet från och med nyåret. Av de från olika orter inkomna rapporterna framgick, att esperantorörelsen i Småland under året haft synnerligen god framgång.

Efter förhandlingarna företogs utfärd till Evedal, där gemensam middag intogs.

SVEDA KRONIKO

BOXHOLM. "La prelego de T. Morariu pri Rumanio prezentata per sudlanda vigleco kaj akompanata de belaj lumbildoj, okazis en esperanto kaj estis lerte interpretata de Sven Uno." ("Östgöten", 9.9.33).

FALUN. Klubo Esperantista de Falun aranĝis 22.8. specialan kunvenon, honore al du germanaj samideanoj, kiuj dum sia migrado tra Svedlando tiun tagon troviĝis en nia urbo. Post bonvensaluto de la vicprezidanto, s-ro Gustav Johansson, unu el la gastoj, s-ro Antula tre interese parolis pri siaj migradoj tra 14 landoj. La 23-an ili vizitis la redakcion de Falu-Kuriren kie ili estis tre afable akceptataj kaj la postan tagon la bonaj Faluanoj povis legi en sia ĉefa ĵurnalo pri la vizito.

H. J.

Esperanta studsemajno por junuloj apartenantaj al Sveda Misia Federacio en Dalarne, okazis en Grangärde Hästberg 3—9 julio. Dum tendarofajro kaj predikkunvenoj publikaj kunhelpis kanthoro kantante kaj svede kaj esperante. Ivar Karlsson rakontis bonhumore pri vojaĝoj al Estonio kaj Polujo, kio, krom ekspozicio de esperantoliteraturo kaj eksterlanda korespondaĵo, faris bonan propagandon. Ĉe la disiĝo sonis la adiaŭoj: Ĝis revido en Stokholmo!

Josabro.

HALLSBERG. 20.9. Paroladon de Morariu, lerte interpretis s-ro Elander. La kurson partoprenas ĉ. 50 komencantoj.

HÖÖR. La Esperantoklubo de Höör kunvenis 28.8., kiam oni decidis pri la vintra laboro. Ĉe la kunveno okazis parolado pri la somera esperantokurso en Silkeborg, Danujo.

N. -n.

JÖNKÖPING. Kelkaj interesuloj en Hovslätt okazigis propagandkunvenon 22.9. Parolado de s-ro Knut Jensie el Jönköping pri utilo de Esperanto kaj kiel oni vojaĝas eksterlande per esperanto. La ĉeestantoj decidis fondi esperantoklubon, kaj elektis estraron. Jen ĝi: Prez. Harald Pettersson, sekr. Nils Pihl, kas. Torsten Jacobsson, Oskar Pet-

4.

4—11 AUG. 1934 är ett viktigt datum. För de svenska esperantisterna i gemen, men i synnerhet för DIG!

tersson kaj Arvid Andersson senfunkcianoj. Decidis aranĝi kurson tuj. Kiel instruanto funkcias s-ro Knut Jensie, Jönköping.

KUMLA. Klubo "La Estonto" kunvenas du fojojn ĉiumonate. La kunvenoj estas sufiĉe bone vizitataj de la membroj kaj la programoj viglaj. 7. 8. la kunveno okazis ĉe Stene Brunn, akvokuracejo 5 kilometrojn okcidente de Kumla. Sidantaj en la eriko ni pritraktis kelkajn gravajn demandojn pri propagando ktp. Nia kantkvarteto kantis bele kaj esperante kaj svede kaj poste oni vizitis la kafejon de la kuracejo. La kunveno ankaŭ estis vizitata de kelkaj samideanoj el Hallsberg.

21.8. la klubo havis viziton de s-ro Morariu kaj gotlanda samideano. La kunveno estis tre grava, kaj interalie ni decidis aranĝi, kune kun la kluboj en Örebro kaj Hallsberg, kurson, kiun gvidos s-ro Morariu. Morariu parolis pri tavivaĵoj en eksterlando. Geklubanoj laŭtlegis poeziaĵojn kaj rakontojn. Sekvis muziko per gramofono ktp.

— 19.9. Konversacia vespero kun bona programo. Vizitis nin sam-ino Claesson el Hallsberg, kiu partoprenis turistvojaĝon al Ruslando aranĝitan de E.T.K. Ŝi tre interese parolis pri kelkaj impresoj de tiu vojaĝo.

— 19.9. Parolado de Tiberio Morariu "Per esp. tra Eŭropo" vigle interpretata de s-ro Ström. Poste provleciono. La kurson por komencantoj partoprenas ĉ. 40 personoj.

KVICKSUND. 17.8. la socialdemokrata klubo kunvenis. Parolis Holger Ekblad pri Esperanto, ĝia historio kaj la grava signifo de Esperanto por la laborista klaso. — La 5.9. la komencanta kurso komenciĝis kun 27 partoprenantoj. La kurson gvidas Holger Ekblad. — 8.9. Daŭriga kurso komenciĝis. Partoprenas 12 interesuloj. La kurson gvidas Ekblad. — 14.9. Esperanto-Klubo de Kvicksund invitis s-anon Henriko Seppik. En nepriskribebla maniero li publike, antaŭ plenplena salono, prelegis pri Estonio, ĝiaj popoloj kaj kulturo. Poste li faris provlecionon, en kiu multaj partoprenis. S-anon Seppik lerte tradukis s-ro Eskil Johansson el Eskilstuna. Post la prelego gaja kunestado. Ĉeestis samideanoj el Eskilstuna, Arboga kaj Kvicksund. *Kverkfolio.*

LINKÖPING. Redaktoro T. Morariu vizitis, dum sia prelega vojaĝo en Östergötland, nian urbon la 5-an de sept. kaj faris publikan prelegon pri "Esperanto en la praktiko" kun lumbildoj. A.-B.F. subvenciis la bone vizitatan prelegon. Post la prelego estis provleciono por varbi partoprenantojn al kurso por komencantoj, kiun havos "La Internacia Stelo". Instruistino Dora Andersson, prez. de la klubo, gvidos tiun kurson.

H. Z.

MALMÖ. Antaŭkongreson en Malmö aranĝis: Malmö Esperanto-Förening, Malmö Soc.-dem. Esperanto-Förening, Tramista Esperanto-Klubo, Laborista Esperanto-Klubo de Malmö kaj SAT-rondo.

La aranĝon partoprenis 25 eksterlandanoj el 7 landoj. Proksimume 200 esperantistoj el tuta Skanio bonvole akceptis la inviton kaj ĉe la propaganda kunveno en la koncerta halo pli ol 900 personoj ĉeestis.

Repr. el Britio, Germanio, Nederlando faris salutparoladojn. Interpretantoj estis Strandmark kaj Norman. La prez. de la laborista komunumo, Erik Bladh, faris bonegan salutparoladon. La ĉefan paroladon de E. Lanti tradukis Oscar Lindberg. Sub gvido de Y. Svensson la kantistaro prezentis belegan kantadon. Estis rezulto de penega ekzercado dum pluraj monatoj. Ni esperas, ke tiu kantĥoro kun membroj el diversaj kluboj restu por estonte.

La posta kolektiĝo en "Moriskan" nombris pli ol 200 esperantistojn. S-ro Lanti faris mallongan paroladon kaj la kantistaro ree aŭdigis sian belan voĉaron. Krome la programo estis privata ĉe ĉiu tablo. *E. Norman.*

Klubo Esperantista de MALMÖ. La revizito de la Esperantoklubo de Holbäck (Danujo) okazis 25.6. 17 Holbäckanoj elŝipiĝis, kiuj kune kun la Malmöanoj pasigis la belegan tagon per bano ktp. en Falsterbo kaj poste amuziĝis en Malmö. Sukcesa tago!

9.7. — ekskurso al la monteto Billebjer apud Dalby. La 40-nombra partoprenantaro promenis de Dalsby. Survoje ni haltis ĉe la malnova preĝejo, kiun ni tre detale rigardis ekstere kaj interne. Tiu ĉi preĝejo, ekkonstruita en la jaro

5. TRE KVARTS år bara är det kvar till dess. Tiden är kort — o. dyrbar!

1080, apartenas al la plej malnovaj en Svedlando. Sur Billebjer ni ĝuis korpe kaj anime en la bela naturo. Vespere ni haltis ĉe la gastejo en Dalby kaj en la ĝardeno, sub la giganta, bonkonata kaŝtano, ni refreŝigis nin kaj aŭskultis kantojn de nia kanthoro.

Partopreninto.

MJÖLBY. 6.9.33. Lumbildparolado de T. Morariu interpretita de S. Uno en al Bontemplanejo. Antaŭ kaj post la parolado amatora orkestro — kun pluraj esp. anoj — aŭdigis belan muzikon.

MOTALA. La parolado de T. Morariu pri Rumanujo estis spicata per amuzaj anekdotoj prilumantaj la humoron de la rumana popolo. La alloga parolado kaj belaj bildoj estis premiitaj per fortaj aplaŭdoj.

La 7.9.33. Morariu paroladis en Motalla-Verkstad (t.e. M.-Uzinoj) pri ia temo: "Per esp. tra Eŭropo."

MUNKEDAL. "Ĉiam Antaŭen" kunvenis 18. 8. La plej grava demando estis la aŭtunaj kaj dumvintraj studadoj. Ni decidis se eble aranĝi tri studrondojn por komencantoj kaj du daŭrigrondojn. Gvidontoj: Knut Schewenius, Fredrik Smith kaj Ivan Dahlqvist. Ankaŭ decidigis aranĝi publikan prelegon kun instruisto Einar Dahl kiel paroladanto. Plue estis decidata inviti la klubojn de la distrikto al kunestado la sabaton antaŭ la studgvidanta konferenco ĉiloke septembre okazonta.

NORRKÖPING. La 9.9.33 Morariu paroladis en esp. sen interpretisto por la verdstelanoj de Norrköping kaj gastoj de Finspång, Skärblacka kaj Arkösund. Morariu paroladante pri siaj travivaĵoj kiel esp.-isto, rakontis ankaŭ aron da bonhumoraj epizodoj.

STOCKHOLM. Grupo Esperantista de Stockholm havis siajn ordinarajn semajnajn kunvenojn:

12.7. Okazis tre interesa parolado de s-ino Julin pri Ruslando. La paroladon ilustris belaj lumbildoj.

19.7. S-roj E. Eriksson kaj J. Johansson parolis pri la XIII-a mondkongreso de S.A.T. kaj la prezidanto laŭlegis el nova esperantolibro: "La sorĉistino el Kastilio" de Salom Asch.

26.7. Okazis lingva studado pere de la

libro "La mono de s-ro Arne" kaj krom tio la sekretario laŭlegis gazetartikolon de du poŝtistinoj, kiuj partoprenis la esperanto-kurson de Andreo Ĉe en Aarnhem, Hollando. Unu el ili, f-ino Hagquist poste servis en la poŝtoŭicejo, kiun oni aranĝis en la popola domo okaze de la S.A.T.-kongreso.

2.8. Estis pridiskutataj la aŭtunaj esperanto kursoj. La komitato, kiun oni elektis por tiujn kursojn, jam mendis d-ron Szilágyi, kiu jam komencis sian laboron en Stokholmo. Kiel fino de tiu vespero okazis dancado.

9.8. Okazis vera internacia kunveno, en kiu proksimume 150 personoj partoprenis, inter ili multaj eksterlandanoj, kiuj vizitis SAT-kongreson. Krom pluraj paroladoj de eksterlandanaj gastoj oni havis la okazon vidi la filmon pri Stokholmo kaj la teatraĵetoj "Jeppson". S-ro Ejve, la Ludanta Tetro, deklamis unu el siaj poemoj, speciale verkita pro la kongreso.

16.8. Al la riĉenhava programo de tiu kunveno ankaŭ apartenis prezentado de la Kolonjo-filmo, kiun la stokholmanoj antaŭe ne havis okazin vidi.

23.8. Aperis "Viva Gazeto", kies enhavo plejparte konsistis el malgrandaj paroladoj. Muziko kaj kantado plenigis la programon de la amuza vespero.

30.8. Por ke la grupanoj havu okazon inviti kaj interesigi siajn neesperantistajn gekonatojn pri nia lingvo kaj kunvenoj, la klubo aranĝis reklaman vesperon al kies programo respondecis la teatra grupo. Muzikadon, kantadon, deklamadon kaj prezentadojn de malgrandaj teatraĵetoj kaj pli longaj teatraĵoj danke akceptis kontenta aŭskultantaro.

6.9. Estis elektata "akcepta komitato", kies laboro estos prizorgi la akceptadon de novaj membroj kaj vizitantoj, kiuj venas al la klubo, kaj enkonduki ilin en la esperantajn rondojn. Krom interesa "Lingva Kvaronhoro" de s-ro Nylén, d-ro Szilágyi laŭlegis fabelon el sia libro "Trans la fabeloĉeano."

13.9. La tutan vesperon okupis dancado, kiun nur rompita tre bonvena kafaŭzo, post kiu oni daŭrigis la dancadon tiel, ke oni dum la hejmenvojo ankoraŭ sentis la dolĉajn brakojn de iu fraŭlino ĉirkaŭ sia kolo.

20.9. Parolis d-ro Szilágyi pri la fama pentristo Albrecht Dürer. La paroladon ilustris interesaj lumbildoj. Post tio oni

transiris al ĝuado de la nuntempe tre bonfama kafo de la grupaj mastrinoj, kies bongustecon pruvis la fakto ke post la fintrinkado ĉiuj stariĝis kaj laŭ la melodio de "Antaŭen ek", kantante marŝis ĉirkaŭ la tabloj.

27.9. Aperis nova numero de la "Viva Gazeto". Krom la tre amuza enhavo, kiu konsistis el paroladetoj kaj teatra radio-prezentado, s-ro Sinha el Hindujo parolis. La kunvenon finis la teatraĵo "La surprizo", kiun oni forte aplaudis.

4.10. La klubo elektis samideaninan komitaton, kiu kudros esperantajn flagojn, kiuj flirtos super Stokholmo venontan jaron dum la kongreso. Gaja numero de "Viva Gazeto" aperis kaj krom tio la teatra grupo prezentis ĝojigan teatraĵon. S. H-son.

ÄLVSJÖ. Esperantorondo kun 16 partoprenantoj. Gvidas inĝeniero Hj. Lindstedt.

ÖREBRO. 21.9. Publika provleciono de Morariu en paroladejo "Svea", kunhelpanto F. Jansson. Kurso por 35 novuloj. Pliaj kursoj en preparo.

23.9. Provleciono de Morariu en la Praktika Lernejo por Komerco kaj Lingvoj. Post la leciono la rektoro gratulis la instruiston kaj rekomendis al siaj lernantoj viziti la kurson de s-ro M.

La loka lerneja inspektoro, d-ro Warne, dissendis cirkuleron al la instruistaro de 11 lernejoj, rekomendante la Ĉemetodajn kursojn de T. Morariu.

ÖRNSKÖLDSEVIK. La Esp.-asocio de Örnköldsvik, kiu dum la lastaj jaroj bone dormis, ekvekiĝis subite pasintan printempon kaj komencis denove la laboron por la Esperantoafero kun sekvo ke nun ne malpli ol 109 personoj partoprenas Ĉseh-metodajn kursojn en Örnköldsvik kaj Domsjö. La vigla, lerta kaj simpatia s-ro Hans Fox el Danzig, gvidas la kursojn.

Fermonto.

Kongressmärken

avsedda att klistras å brev och försändelser såsom reklam för 1934 års esperanto-kongress i Stockholm, tillhandahålles till 50 öre arket hos LKK för XXVI Universala Kongreso de Esperanto, Fredsgatan 4, Stockholm.

De ĉie - pri ĉio - al ĉiu.

Nederlanda Esperantisto: Oni inaŭguris en Bergen op Zoom, Zamenhof-monumenton la 29-an de julio. La urbestro S-ro Blom parolis Esperantlingve.

Flandra Esperantisto: (aug.) La 4-an Flandran Kongreson 215 kongresanoj partoprenis en Mechelen.

El la *Svenska Arbetar-Esperantisten* (julio) ni citas kelkajn versojn de la 17-jara blinda poetino Elsa Nordkvist: "Vigla alaŭdo revenis de l' sudo, — kantas senĉese pri kara ideto. — Laŭte ridante, fervora en ludo, — saltas argenta arbarrivereto. — Bele verdiĝas herbejo, ĝardeno, — ĉiu nur estas plezuro kaj beno." Tre interesa estas la polemika artikolo de A. V. Bergsten, kiu pledas por la idealismo de la Esperantistoj. Jen la fino: "Vi diras, Svanteson, ke idealismo de tia movado certe malutilas. Sed ho ne! Pro kio malutilus la disfalo de la naciaj baroj eĉ, se ĝi estus nur parta? Kiu verkis la lingvon? Idealisto. Kiuj propagandis ĝin unue? Idealistoj!! Eble la plej multaj estas esperantistoj pro voko de idealistoj? Jes! — La malutilo ne estas en la esperanta idealismo, sed en la sagoj, kiuj mortigas la idealismajn adeptojn." — La kontraŭalkohola ordeno "Verdandi" (Sthlm, Upplandsgatan 1) preparas liston pri NOV-anoj, sciantaj Esperanton.

Bulteno de Ĉehoslovaka Asocio Esp. (15.7.) Tre interesa estas la gvidartikolo de d-ro Pitlik, kiu ĵus estis 50 jara. La titolo estas: "Propagandu serioze!" Jen citaĵo: "Ne ŝajnas esti serioza propagando, . . . se oni sur la vizitkarto uzas titolon "profesoro" de Esp., farinte nenian ekzamenon; se oni gvidas kursojn ne regante bone la lingvon, se oni la facilecon de Esp. pravas per asertado, ke ĝi dum unu semajno estas perfekte ellernebla. . . ."

Informoj el Estonio (Julio): Tre interesa estas la raporto pri la jubilea kant-festo. La radio-raportado okazis estone kaj Esperante. El 9 oficistoj de la Informa oficejo 7 parolis Esperanta. Multaj Esperantistoj ĉeestis.

7. STORA händelser förberedas grundligt och i tid. Esperantokongressen i Stockholm ÄR en stor händelse!

Pola Esperantisto (Julio): Dank' al klopodoj de A. Mirkowicz, fondiĝis Esp. Sekcio ĉe la Pola Instruista Asocio, kaj la 12.6. okazis la prelego de B. Strelczyk pri la sola solvo de la internacia lingvo, pri Esperanto. La Asocio havas 50.000 membrojn, inter tiuj gravegaj nomoj, kiel senatano Nowak, parlamentano Smulikowski ktp. La ĉefa instruista organo "Głos Nauczycielski" havas konstantan Esp.-angulon, krome ejon por kursoj ktp.

La Suda Stelo (Julio): Franjo Homar, talenta propagandisto kaj verkisto en Esp. tragedie mortis sub lokomotivo.

La Verda Lumo (Ŝanhaj). El sprita humoraĵo, karikaturanta la ĥinan ĝentilecon: "Ekzemple jen la interparolo: .. Kie estas via paradizo? (hejmurbo) — Mia kabano estas en la urbo A. Kiu estas tiu ĉi sinjoreto? .. Mi prezentas al vi, li estas mia hundeto (filo) ktp, ktp."

Verda Mondo: (Julio) S-ro Takahaŝi skribas: Ni marŝu antaŭen por la bono de naciismo, — sed ne forgesu, ke ni rajtas uzi Esperanton eĉ por milito, se necese...." (Ĉu ni vere ne forgesu??)

Hungara Heroldo (Julio): "Hura" — la romano de Julio Baghy aperis germanlingve.

"*La Esperantisto*" (Tokio) instruas la japanan lingvon pere de Esperanto. Laŭ nia opinio Esperanto tamen estas iomete pli facila. Jen ekzemplo: Mi kuris rapide = Uatakuŝi ua hajaku haŝiri-maŝita. *Fersil.*



Gratuloj al ges-oj Morariu.

Okaze de la naskiĝo de la unua infano de l' propagandista esperanto-paro, gesinjoroj Morariu ricevis varmajn bondezirojn de la fama sveda aŭtorino Selma Lagerlöf (kun kiu ili konatiĝis je pli frua intervjuo vizito en la hejmo de la verkistino en Mårbacka).

Bondeziris interalie la Sveda Trafika Asocio, la kunaranganto de la Stokholma mondkongreso.

La rumana legacio ankaŭ sendis korean gratulon el Stokholmo.

Kaj fine nun la sveda geesperantistaro kore gratulas.

Norvega veterano.

Honoratus Bonnevie 75 jaroj.

